Recenzo

Rimarkoj pri la nova eldono de *Bibliografio di Ido*

Philodemus Triland

Pro quo bibliografio di Ido?

Interlingvistiko malofte estas ŝtate protektata aktivado. Do libroj, revuoj kaj alispecaj dokumentoj riskas facile perdiĝi. Tio validas por Esperanto kaj por ĉiuj lingvoj artefaritaj. Stojan redaktis gravan Bibliografion pri la tuta interlingvistika materialo. Ni konstruis laŭpove kompletan repertuaron de libroj kaj revuoj pri Ido, sed kie ankaŭ Esperanto estas ofte menciata.

La unua eldono de tiu repertuaro bibliografia aperis dank' al Haupenthal kaj al Carlevaro en 1999. En 2015 aperis la dua eldono kaj en 2020 la tria, kun novaj redaktoroj (Carlevaro, Neves kaj Madonna, tri konataj specialistoj).

Strukturo de tiu repertuara libro

La libro proponas tri enkondukojn (1999, 2015 kaj 2020) kaj liston de revuoj kaj de libroj. La libroj aperas en du katalogoj: laŭ la alfabeta ordo de la aŭtoroj kaj laŭ la aper-jaro.

Por faciligi la trovon de verko, la bibliografio indikas, en kiu publika biblioteko ĝi estas konservata. Ankaŭ la libroj de Haupenthal estas konsulteblaj en la Bavara ŝtata biblioteko, en Munkeno.

Kie vi povas trovi la Bibliografion de Ido?

Konsultebla en papera eldono ĉe:

- Schweizerische Nationalbibliothek, Bern (Svislando)
- Bayrische Staatsbibliothek, München (Germanio)
- Sammlung für Plansprachen und Esperantomuseum, Österreichische Nationalbibliothek, Wien (Aŭstrio)
- Biblioteca Cantonale Ticinese, Bellinzona (Svislando)
- Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale (CDELI), La Chaux-de-Fonds (Svislando)
- Biblioteko de la Universiteit van Amsterdam (Nederlando)

Unika verko ekskluzive bibliografia pri interlingvistiko, senpage kaj senkontrole elŝutebla en PDF-formato:
Carlevaro, Haupenthal, Madonna, Neves: Bibliografio di Ido,
Eldonita en Svislando, en 2020, kun 318 paĝoj. En PDF-formato.
Vi trovas ĝin en la retejo de Tazio Carlevaro,
kie vi atentu ne elŝuti pli malnovan eldonon:
http://www.taziocarlevaro.ch/Docs_da_scaricare/aspetti_linguistici.html

Kaj ankaŭ en Internet Archive, je la adreso:
https://archive-org/details/bibliografio-di-ido-3ma-ed-2020

Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA! Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA kaj inviton al akcepto en la Universala Kongreso. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.

Pliaj informoj ĉe *https://uea.org/alighoj*